Vintro 2012 -2013 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 27, No 110

# La Riverego

La gantoj, perloj kaj cervoj 2
Monda Pupekspozicio 13
Kievo... Kioto 15
Ni honoru nian antaŭulon 16
Plia flago por la Tero 19
Esperanto en Burlington 21
La dancmetodo de M. Morris 22
Literature 23
Nova kurso ĉe Lernu 26
Anonce 27



## Esperanto-societo kebekia festas sian 30-jariĝon !

## *La société québécoise d'espéranto fête son 30ème anniversaire !*



# La gantoj, perloj kaj cervoj

*Ĵenja (Yevgeniya) Amis*

**Parto II**

**(*legu la komencon en La Riverego 109*)**

***Avec notre rédactrice, nous allons visiter une entreprise japonaise en compagnie de son ancien président, nous allons voir la Ville de Perles, Kobe, et l'ancienne capitale du Japon, Nara, où se trouve la plus grande et la plus ancienne constructions en bois au monde et où les cerfs sont aussi nombreux que les monuments historiques !***

**Mi ofte legis, ke japanaj kompanioj estas tre malsamaj ol tiuj en Eŭropo kaj Nord-Ameriko, kaj mi ĉiam revis viziti japanan laborejon. Dum nia tri-semajna vojaĝo, ankaŭ tiu ĉi revo plenumiĝis — kaj kiel ! Ni vizitis japanan entreprenon akompanataj de ĝia honora prezidanto !**

La sekva halto de nia tri-semajna vojaĝo en Japanio estas la insulo Ŝikoku, la plej malgranda el la ĉefaj japanaj insuloj, kiu situas ĉ. du horojn for de Honŝu, la ĉefa insulo. Inter Honŝu kaj Ŝikoku troviĝas eta monteca insulo kovrita de rizkampoj, ofte aranĝitaj laŭ kelkaj etaĝoj : tion postulas la agrikulturo en la montaro. Nia celo en Ŝikoku estas vizito al S-ro Etsuo MIYOSHI, mia korespondamiko de pluraj jaroj kaj honora prezidanto de la kompanio Swany (kaj krome kavaliro de Ordeno de Merito de Pola Respubliko !). Li naskiĝis sur tiu ĉi insulo kaj tre bone konas la lokon. Mi konstatas, ke same la lokanoj bone konas lin : en restoracioj kaj foje eĉ simple surstrate homoj salutas lin kaj respekte



Kun laborantoj de la Nova Turisma Asocio

nomas lin « ŝaĉo » — kompaniestro. Fakte, eĉ la nomo de lia kompanio, Swany (Cigno), estis elektita por honori la naskiĝurbon de la familio Miyoshi.

« Trionon de mia tempo mi dediĉas al la kompanio, trionon al Esperanto, kaj trionon al la laboro en Nova Turisma Asocio de Higaŝikagaŭa », diras al ni Etsuo. Fakte, Esperanto ludas gravan rolon en la laboro de tiu ĉi organizaĵo : ĝi jam du-foje okazigis grandan pup-ekspoziciojn, kun pluraj centoj da pupoj senditaj de esperantistoj el kvardeko da landoj (pli detale, sur p. 14 — red.). La laborantoj de la turisma asocio estas ankaŭ talentaj artistoj : ni vizitas la ekspozicion de iliaj pentraĵoj dediĉitaj al fama japana kantistino de bugio, Shizuko Kasagi — ni estas tre bonŝancaj, ĉar ni trafis la lastajn horojn de tiu ĉi evento !



Apud la turisma asocio troviĝas 300-jara japana domo (kvankam tute renovigita antaŭ cent jaroj), kiu antaŭe apartenis al japana riĉa terposedanto. Post la Dua Mondmilito oni dividis lian terenon, kaj la domo fariĝis muzeo. La konstruaĵo estas ekstreme fortika — same kiel ĉiuj, aparte malnovaj, japanaj domoj, ĝi estis farita por elteni tertremojn, kaj la gvidanto de la muzeo rakontas amuzan historion ĉi-rilate. Iam germanaj turistoj, vidinte en la subtegmento la strukturon de la domo (kiu konsistas el ne prilaboritaj arbotrunkoj, por esti pli fortika), miris kaj demandis, ĉu en Japanio ne troviĝas ĉarpentistoj, por prilabori la lignon. « Se ne troviĝas, vi ja povas inviti ilin el Germanio », ili diris, tute sincere kaj bonintence. En la domo oni montras al ni mekanikan lignan pupon, kiu… servas teon ! Ĝi iras sur tapiŝeto, turniĝas je ĝusta flanko, haltas kaj rekomencas sian vojon, kiam la teo estas prenita. Estas malfacile kredi, ke tiu pupo estas ĉirkaŭ cent-kvindek-jara !

# Pri bonzo, gantoj kaj amo !

Trinkinte bongustan malvarman hordean teon, servitan de nia bela mekanika servisto, ni iras al la malnova gantofarejo, kie nun troviĝas muzeeto. Rigardante la malnovajn ilojn, estas malfacile imagi, kiel oni povas fari gantojn per tiom eta kudromaŝino, rulante la radojn per unu mano kaj tenante la kudraĵon per alia... kaj ĉio ĉi, kun duonmilimetra precizeco ! Kiel klarigas al ni nia bonkora ĉiĉerono, la insulo Ŝikoku estas ankaŭ nomata « ganta insulo », ĉar gantoj estis unu el ĝiaj ĉefaj industrioj dum la lasta jarcento. Laŭ S-ro Miyoshi, tuj post la Dua Mondmilito, en Ŝikoku estis 300 gantokompanioj — nun restas ĉirkaŭ sesdeko, kaj 90% de iliaj produktaĵoj estas farataj en Ĉinio. Kurioze, la prezoj de gantoj tute ne ŝanĝiĝis en la lastaj kelkdek jaroj — simple nun, por atingi la saman prezon, oni devas produkti en Ĉinio... aŭ malaperi. Ironie, tiu ĉi translokigo de fabrikoj de Ŝikoku okazas pro la sama kialo, kial Ŝikoku mem siatempe fariĝis la « ganta insulo » : malmultekosta laboro… Plus — amo!

Kial amo ? Mi tuj klarigos ! Iam, meze de la deknaŭa jarcento, bela junulino el nobela familio enamiĝis al malriĉa bonzo. Ŝia familio ne volis tiun geedziĝon, kaj la amantoj do sekrete geedziĝis kaj fuĝis al la urbo Osako. Tie ili lernis la gantan metion kaj heredigis ĝin al sia filo, kiu fariĝis granda industriisto kaj kiu translokis la fabrikon al Ŝikoku. En la fino de la 19a jarcento ŝipoj inter Ŝikoku kaj Osako iris ĉiutage : de Osako, por transporti krudajn materialojn, kaj de Ŝikoku por alporti pretajn gantojn. Do, eble pro tiu bela am-historio dum multaj jardekoj oni produktadis la gantojn… kun amo ! La diverseco de la gantoj en la muzeo estas neimagebla. Mi trovas tre interesaj longajn kontraŭsunajn gantojn, kiuj kovras la tutan brakon lasante nekovritaj nur la pintojn de la fingroj : virinoj portas tiajn gantojn somere, por ne sunbruniĝi (kuriozaĵo por la eŭropaninoj/nord-amerikaninoj, kiuj ŝatas esti sunbruniĝintaj !).


Tie ĉi « kreskas »… gantoj !


La fondinto de la ganta industrio de Ŝikoku

## En Swany




« Lerni la gantofaradon daŭras kvin jarojn »

Lerninte la gantan teorion en la muzeo, ni iras viziti la oficejon de Swany por vidi, kiel ĉio funkcias en la praktiko. Gantoj ne estas la sola produktaĵo de Swany — alia ĝia produkto estas la « walkin' bag » — bastonvalizo, inventita de Etsuo mem : malsaniĝinta je poliomjelito infanaĝe, li ĉiam mem promenas kun du bastonvalizoj de Swany. Bastonvalizoj estas ne nur pli belaj kaj pli diskretaj ol kutimaj promenbastonoj, sed ankaŭ tre praktikaj : ili ja ankaŭ uziĝas por aĉetumado ! Eĉ se « walkin' bag » eniris la merkaton antaŭ ne tiom longa tempo (en 2000), kun nur 25% el ĉiuj produktaĵoj de Swany (la ceteraj 75% estas gantoj), ĝi tamen donas 75% de la tuta profito.

Nun estas malfacile kredi, ke S-ro Miyoshi devis defendi la ideon de bastonvalizo, al kiu kontraŭstaris ĉiuj tiamaj estraranoj de la korporacio. (Etsuo rimarkas kun bedaŭro, ke li devis maldungi ilin, simple por povi antaŭenigi tiun ideon.) Fakte, tiu lia inventaĵo servas ankaŭ al sukceso de Esperanto, ĉar Etsuo rezignis la rajtojn je ĝi favore de la korporacio, kondiĉe ke li povu uzi 10% de ĝia neta profito por Esperanto. Estas dank' al tiu aranĝo ke li povis publikigi tut-paĝajn reklamojn pri Esperanto en ĉefaj eŭropaj gazetoj, kaj nun organizas la premion « Cigno » por verkado pri Esperanto.

En la japana oficejo de Swany laboras iom pli ol cent personoj. Tie oni faras prototipojn de gantoj (laŭ Etsuo, lerni la gantofaradon daŭras kvin jarojn), kaj poste produktas ilin en Ĉinio. Ricevinte jam pretajn gantojn, oni zorgeme kontrolas ĉiun paron por ĉiuspecaj difektoj : unue, oni pasigas gantojn tra du metaldetektiloj (por certigi, ke ne estas lasita peco de rompita kudrilo), kaj poste kontrolas ĉiun paron permane. En la japana oficejo de Swany oni ankaŭ dezajnas la bastonvalizojn (ofte kunlaborante kun eksteraj dezajnistoj el Tokio), distribuas kaj riparas rompitajn valizojn. La valizoj venas kun unujara garantio, kaj S-ro Miyoshi tre fieras, ke oni riparas kaj resendas la valizojn ene de nur unu semajno, je la granda ĝojo de la klientoj.

La oficejo de S-ro Miyoshi estas malgranda kaj modesta — simpla labortablo dividita de eta negocotablo. Tie angule staras granda leda valizo, kiu helpis al li dum longaj vojaĝoj kaj kiu fakte inspiris lin inventi « walkin’ bag ». La dezajno de bastonvalizo multe ŝanĝiĝis ene de ĝia dekjara historio. Se la plej fruaj versioj estas pli similaj al apogaj vojaĝvalizoj, nun ekzistas malgrandaj bastonsakoj kaj eĉ tute etaj bastonmansakoj. Jen matematika demando. Kiel eblas, ke virinoj, estante ĉ. 50% de la loĝantaro, aĉetas 70% de ĉiuj bastonvalizoj ? Tre simple ! Se viroj aĉetas nur unu bastonvalizon, virinoj aĉetas du, tri aŭ pli, malsamkolorajn kaj malsamstilajn. Iu virino aĉetis dekon da ili en unu fojo, fiere rakontas Etsuo.



## « La kliento estas la reĝo »

Mi ofte aŭdis pri la estroj de kompanioj, kiuj legas ĉiujn leterojn, sed tio estas la unua fojo, kiam mi renkontis tian homon ! En ĉiu vendata valizo troviĝas poŝtkarto kun eta enketilo kaj instigo sendi la komentojn al Swany, kiu ricevas ĉirkaŭ 7000 tiajn poŝkartojn jare. S-ro Miyoshi persone legas ĉiujn el ili, kaj eĉ mem respondas, se estas demandoj. Tre ofte uzantoj simple dankas pro tiu ĉi inventaĵo, kaj foje ili sendas valorajn sugestojn : ekzemple, la bastonmansako estis unu el tiaj sugestoj. Foje homoj skribas simple, ĉar ili sentas sin solecaj kaj rakontas pri malfacilaĵoj de sia vivo... Iam — vi povas ridi aŭ plori ! — unu virino skribis, ke ŝia edzo mortis en aŭtoakcidento, kaj petis helpi al ŝi... trovi novan edzon !

Eĉ se Swany ne povis helpi pri tiu specifa peto, la kompanio (kiel ĝenerale en Japanio) tre fieras pri la bonega servo al klientoj. Se venas demandoj, oni provas respondi tuj : iu kliento eĉ sendis ĉokoladon, kiam ene de tri tagoj li ricevis respondon al sia demando. Kaj unu persono eĉ venis el Tokio por danki la riparan departementon, ĉar, forgesinte skribilon en la sako, li rericevis ĝin kun aldonita letero. Estas ĝuste la klientoj (ĉi-foje, vendistoj), kiuj instigis la kompanion ŝanĝi la aspekton de bastonvalizoj — ili trovis la originalan nigran stilon ne tiom bela. Ĉar S-ro Miyoshi mem dezajnis la valizojn komence, estis malfacile gluti tiun komenton, « Sed kion fari ? — la kliento estas reĝo », li diras ridetante.

## Kobe de sur la « tambura turo »

De Ŝikoku ni revenas al Honŝu por viziti la havenan urbon Kobe, kie, same kiel en ĉiuj vizititaj lokoj, nin atendas esperantistoj. Ni faras la rondon tra la urbocentro per rapidega senŝofora unurelvojo, kie mi ne povas rezisti la tenton fotiĝi ŝajnigante min ŝoforo.

Kobe estas tre malĝoje konata pro la terura tertremo de 1995, en kiu mortis pli ol ses mil personoj. Ĝi frapis frumatene, kiam multaj homoj ankoraŭ estis en la lito… La monumento al la mortintoj dum la tertremo, kun la nomoj de ĉiuj viktimoj, estas la unua loko, kiun ni vizitas. Same kiel en Hiroŝimo, ni vidas la striojn da kunplektitaj paperaj gruoj. De la fama 90-metra « tambur-turo » — simbolo de Kobe — ni povas vidi la tutan urbon ĉe la montaro kaj la Kobe-havenon, kie troviĝas grandaj ŝip-farejoj de la du japanaj gigantoj : Kawasaki kaj Mitsubishi.

Tiu ĉi haveno estis plene rekonstruita post la tertremo, sed oni lasis, kiel rememoraĵon, kelkajn partojn de la kajo, tute torditajn pro la tertremo. De la supro de la turo ni ankaŭ vidas tri (!) kristanajn preĝejojn. Du estas sur la tegmentoj de hoteloj. Bone, ne temas pri veraj preĝejoj (almenaŭ ne tiuj du sur la tegmento) — sed pri specialaj preĝejoj, kie okazas geedziĝoj, ĉar japanoj tre ŝatas la aspekton de okcident-stila geedziĝo (tiom ordinara por ni en Nord-Ameriko !). Ankaŭ la reklamoj pri kristan-stilaj geedziĝ-servoj estas ĉie. Mi ne povas ne ŝerci, ke mia edzo Joel, kiu tiom ŝatas religiojn, maltrafis belan karieron kiel falsa eŭrop-aspekta pastro en Japanio !

## Kiel ni maltrafis alian karieron

Kobe estas ankaŭ internacie konata pro siaj perloj, kaj ni iras viziti etan perlan muzeon. Jam preskaŭ elirantajn, nin salutas muzea laboranto. Li tre pardonpetas, ke la muzeo ne estas klimatizita kaj ke ni devas suferi en tia varmego. Li invitas nin al sia oficejo, kiu estas klimatizita, kaj regalas nin per malvarma teo. UTSUMI Yoshihiro tre bone parolas la anglan… sed ŝajne (mi vere ne povas






Kun anoj de E-societo de Kobe

kredi tion !) kun sveda akĉento ! « Mi loĝis en Svedio », li respondas mian silentan demandon.

Yoshihiro havas grandegan perlon pinglitan sur lian kolumon. Kaptinte nian rigardon, li donas la perlon al mi kaj demandas tre strangan aferon : « Kiu estas ĝia koloro ? » Ni atente rigardas — ĝi fakte ne estas unukolora, sed ŝanĝiĝas laŭ la lumo: jen ĝi estas verda, jen ruĝa. Sed kaj mi kaj Joel konsentas, ke ĝi tamen estas verda. « Ĉu vi frenezas ? » li diras. « Ĝi estas ruĝa ! Se ĝi estus verda, ĝi kostus 700 $, sed ĝi kostas nur 300 $ ! Se vi estus profesiaj pritaksistoj de perloj, vi malgajnus 400 $ en unu momento ! » Jes, estas tia profesio — pritaksistoj de perloj, rakontas Yoshihiro. Ene de duonsekundo (vi bone legis : duonsekundo !) ili devas pritaksi la valoron de perlo. Kaj tiel dum pluraj horoj ! Nu, ŝajne la laboro de perlopritaksistoj ne estas por ni — en tia ritmo ni povus perdi kelkajn milionojn da dolaroj en kelkaj horoj ! Fakte, Yoshihiro mem diras, ke li ne povus fari tiun laboron, eĉ malgraŭ tio, ke li laboras jam kvar jarojn kiel ĝenerala direktoro de la japana perl-eksporta asocio — oni devas trejniĝi kiel perlopritaksisto dum dek jaroj antaŭ ol ekzerci tiun metion !

Li ankaŭ turnas nian atenton al la fenestroj de la konstruaĵo — ili ja aspektas iom malsame ol kutimaj fenestroj, kaj ŝajne eĉ la lumo en la oficejo estas iom alia ol kutime : tio estas, ĉar la fenestroj estas faritaj el la plej multekosta vitro — la sama, el kiu oni faras bonkvalitajn okulvitrojn. Kial ? Ĉar en tiu konstruaĵo laboras perlopritaksistoj, kaj, kiel vi jam scias, la vitro devas neniel tordi la lumon, por ne ŝanĝi la koloron de la perloj. Sed, eĉ kun tiaj fenestroj, la pritaksistoj povas labori nur kelkajn horojn de la tago : inter 7 h 30 kaj 12 h 30 — kiam la sunlumo estas plej neŭtrala.

## Perloj... kaj pano !

Malgraŭ tio, ke la perlokultivado ne originas en Kobe, la urbo estas tamen nomata La Perla Urbo. Kial ? Jen klarigo. Pioniro en perloprilaborado — Todo Yasuie, kiu translokiĝis al Kobe perdinte ĉiujn siajn terojn pro inundego — malkovris en 1921, ke makuletoj sur perloj malaperas, se ili estas prilaboritaj per certa kemiaĵo. Li aplikis tiun

malkovron, kaj, ĝuste dank' al tio, la kosto de perloj draste malaltiĝis, kaj Yasuie mem fariĝis riĉulo. Tamen, li decidis ne patentigi sian malkovron, dirante : « Ĝi devas prosperigi ĉiujn, ne nur min. » Ĝuste pro ĉi-strebo disvastigi tiun teknologion tra la mondo Kobe fariĝis konata kiel la Perla Urbo. Alia interesaĵo : Kobe estas fama pro sia pano (malgraŭ tio, ke pano ne estas tradicia por Japanio), ĉar ĝi estis unu el la unuaj urboj, kiuj malfermiĝis al eksterlandanoj kaj kie ili povis loĝi en kiu ajn urboparto (en ĉiuj aliaj urboj estis limigoj al tio).

Trinkante la teon, ni ankaŭ lernas diversajn aliajn aferojn pri perloj. Ekzemple, ke japanaj perloj estas inter el la plej altkvalitaj en la tuta mondo : la diversaj sezonoj de Japanio kaj ŝanĝiĝoj de temperaturo aldonas multajn kolorojn kaj apartan brilecon al japanaj perloj. Nun ili feroce konkurencas kun ĉinaj perloj, multe malpli kostaj kaj ĉefe kultivitaj en malsala akvo. « Se en Japanio en unu konko oni kultivas 1-2 perlojn, en Ĉinio oni foje sukcesas kreskigi ĝis 50 (!) perlojn en unu konko, kompreneble, je la kosto de kvalito, » diras Yoshihiro. En la vendejeto ni vidas kaj tre grandajn perlojn, kaj la plej etajn perlojn, apenaŭ du milimetrojn : ni ne povas eĉ imagi, kiel oni povas truigi ilin por fari kolĉenon el pluraj centoj da ili !

## La dekstruloj ŝanĝas niajn planojn

Niaj gvidantoj planis viziton al la urbodomo, sed, bedaŭrinde, ĝi estas fermita pro la bruemaj dekstruloj, kiuj okupis la lokon apud ĝi. Bonŝance, neniuj preterpasantoj haltas por aŭskulti la dekstrulojn sur la kamioneto kun laŭtparolilo. « Kion ili volas ? » mi demandas — « Nenion apartan — simple okazas kunveno de la maldekstrema instruista sindikato, kaj tio estas bona preteksto por brui. » Do, ŝanĝiĝo de la planoj ! Anstataŭ iri al la urbodomo, ni iras butikumi laŭ longa butikaro sub tegmento (tre agrable esti en la ombro dum tia varmega tago !) kaj vizitas cent-enan vendejon — similan al unudolara vendejo en Nord-Ameriko, sed kun pli granda elekto de varoj. Kuriozaĵo : oni vendas personan stampon por ĉiuj kutimaj familinomoj — ĉar ĉiuj skribas la ideogramojn same, oni bezonas personan stampon anstataŭ la subskribo. Kompreneble, tiuj stampoj el cent-ena vendejo estas amas-produktitaj kaj servas nur por tre leĝera uzo. Se oni volas, ekzemple, malfermi konton en banko, oni bezonas speciale faritan personan stampon, kiun oni devas gardi en sekura loko.



Ni aĉetas niajn revenbiletojn el loko, kiu vendas rabatitajn biletojn por la trajno. « Kiel eblas ? » ni



La Horju-ĵi-templo kaj pagodo : plej malnovaj lignaj konstruaĵoj en la mondo

demandas, ĉar tio aspektas iom suspektinda. Oni klarigas, ke tio estas tute laŭleĝa : multaj japanaj fervojaj kompanioj estas privataj, kaj la akci-posedantoj (kiuj ricevas biletojn) ofte vendas ilin malmultekoste al tiaj vendejoj. Foje oni eĉ vendas rabatitajn biletojn en la stacidomo mem !

## La cervoj kaj la temploj

El Kobe ni revenas al Kioto — nia kansaja « bazo ». De tie ni povas viziti plurajn aliajn urbojn en la belega kaj historiplena Kansaja regiono. Unu el tiaj tagaj promenoj estas vizito al Nara, nemaltrafinda malnova ĉefurbo de Japanio dum la prospera oka jarcento. Same kiel ĉie, ni promenas en Nara en akompano (kaj kun bonega ĉiĉeronado) de esperantisto, S-ro Kɪᴍᴏᴛᴏ Kasuhiro, kiu (bonŝance !) translokiĝis al Nara de Kobe en 1994, do, unu jaron antaŭ la tertremo. Sur la stacidomo de Nara troviĝas afiŝoj de eta ĉarma bonzo kun cervaj kornoj — jen sintezo de la du plej gravaj allogaĵoj de Nara : temploj kaj cervoj, ambaŭ abundaj. Fakte, en Nara troviĝas pluraj el la plej famaj japanaj vidindaĵoj — sur la mapo, kiun ni ricevas en la turisma centro, estas indikitaj ĉirkaŭ deko da Mondaj Heredaĵoj de UNESCO.

Alia vidindaĵo de Nara (eĉ se ne deklarita Monda Heredaĵo) estas la ĉarmaj japanaj cervoj — *ŝika*. Laŭ legendo, kiam oni fondis familian sanktejon de la nobela familio Fuĵiŭara (la plej influa klano en la oka jarcento), oni invitis potencan dion por protekti la lokon. La dio venis sur blanka cervo. Ekde tiam la cervoj estas rigardataj kiel diaj mesaĝistoj kaj profunde respektataj. Onidire, antaŭ longa tempo unu knabo estis eĉ ekzekutita, ĉar li mortigis per ŝtono cervon, kiu manĝis la paperon kun lia hejmtasko... Malsame ol sur la insulo Mijaĵima, kie oni ne permesas manĝigi cervojn kaj kie la cervoj estas iom miskondutaj, en Nara neniu malpermesas tion fari — fakte, oni eĉ vendas *ŝika senbei* — kuketojn por la cervoj. Eble pro tio la cervoj en Nara estas bonkondutaj : ili trankvile atendas siajn kuketojn kaj tute ne provas ŝteli vian (ege bongustan !) mapon.

La Kofuku-ĵi-templo kaj bela kvin-etaĝa pagodo estas nia unua halto. Antaŭ du jaroj, tiu ĉi templo



« Daibutsu-den »

festis sian 1300-jariĝon, kaj tiu ĉi pagodo estis konstruita en 1426, post kiam ĝi brulis jam kvin (!) fojojn. Nia gvidanto rimarkas, ke en Japanio oni havas nur tri- aŭ kvin-etaĝajn pagodojn — neniam kvar, ĉar la vorto « kvar » sonas kiel la vorto « morto ». Ĝuste pro tio en hospitaloj ne troviĝas ĉambroj aŭ etaĝoj markitaj per cifero « kvar » (nek per « naŭ », kiu sonas kiel « sufero »). Por ke la pagodoj eltenu la tertremojn, oni pendigas supre arbotrunkon, kiu stabiligas la konstruaĵon dum la tertremoj. Todai-ĵi-templo — pli bone konata sub la nomo « Daibutsu-den » (Grand-Budha Halo) — estas nia sekva halto. Fondita en la oka jarcento, Daibutsu-den (la halo, kie trovigas la Granda Budho) brulis du fojojn pro diversaj militoj. La nuna konstruaĵo, kiu estas nur du trionoj de la originala, staras ekde 1709, sed eĉ malgraŭ tiu malgrandiĝo, ĝi estas la plej granda ligna konstruaĵo en la mondo !

## « Industrio por profiti de malfeliĉuloj »

Ni trapasas la praarbaron, apud kiu troviĝas kelkaj ŝinto-sanktejoj kun miloj da lanternoj, sur kiuj ofte estas skribitaj nomoj de donacantoj al la sanktejo. La etoso en kaj apud la ŝinto-sanktejoj estas tute malsama ol tiu de budhistaj temploj : ĉiuj ŝinto-sanktejoj troviĝas en la arbaro, dum budhistaj temploj pli ofte troviĝas en malfermaj spacoj. Tamen, kaj en ŝinto-sanktejoj, kaj en budhistaj temploj (kiuj ofte troviĝas tuj apude), oni abunde vendas amuletojn por ĉiu okazo de la vivo. Apud Daibutsu ni vidis eĉ « budhomaton » : aŭtomaton, kiu vendas budhojn en « plastaj ovoj » ! Ni vidis en Japanio vendoaŭtomatojn por ĉio, eĉ kravatoj. Sed Budhoj ?... « Religioj en Japanio estas bona industrio por profiti de malfeliĉuloj, » rimarkas nia saĝa gvidanto.



Almenaŭ la cervoj ne estas karnovoraj !

Dum nia vojaĝo, mi ofte demandis al diversaj homoj la saman demandon : « Kiu estas via religio ? » Rimarkinde, la respondo preskaŭ ĉiam estis : « Mi ne estas religiema. » Kurioze, en la praktiko multaj japanoj tamen iras kaj al budhistaj temploj (ofte estante membroj de unu el ili) kaj al ŝinto-sanktejoj por preĝi. Nia gvidanto ankaŭ atentigas, ke en la japana lingvo, la vorto por « preĝi » estas sama kiel la vorto por « peti », do, plejofte oni iras al temploj por iu peto al dioj (bone fari la ekzamenon, trovi amat/in/on, ktp).



Ni lernis, ke en Japanio estas tre strikta « divido de agokampoj » inter la religioj : do, kristanismo okupiĝas pri modernaj geedziĝoj ; ŝintoismo pri ĉio, rilata al vivo (ekzemple, bebo-dediĉo, tradicia geedziĝceremonio kaj ĝenerale feliĉo kaj sukceso), kaj budhismo pri ĉio rilata al morto (ofte sur la tereno de budhistaj temploj troviĝas tombejoj).

Horju-ĵi-templo *(vidu bildon sur la antaŭa paĝo)* estas nia lasta vidindaĵo en Nara. La templo kaj la apuda pagodo staras netuŝite ekde la frua oka jarcento (kvankam eĉ ili ne estas la originalaj konstruaĵoj : la originaloj forbruliĝis en la frua sepa jarcento). Tiuj konstruaĵoj estas la plej malnovaj lignaj konstruaĵoj en la tuta mondo ! Estas malfacile kredi, ke tiuj belegajn konstruaĵojn, faritajn el la ligno de japana cipreso, neniam damaĝis la fajro, nek la tertremoj !

## Oni devas koni la lokojn !

Por fini la perfektan tagon, S-ro Kɪᴍᴏᴛᴏ portas nin al sia plej ŝatata drinkejo, kiu troviĝas sur malantaŭa strato, tute kaŝita per aliaj konstruaĵoj, sen ŝildo. Ĝi troviĝas en simpla eta japana domo, kie sur la dua etaĝo troviĝas la loĝejo de la posedantino. Ni komprenas, kiom bonŝancaj ni estas viziti tiun lokon — ja eksterlandanoj (kaj eĉ ne-eksterlandanoj !) venas ĉi tien nur invitite de iu lokano. Tiu « ekskluziveco » tute ne estas intenca, diras la sesdekjaraĝa posedantino, kiu translokiĝis al Nara de Tokio. Ŝi estas tre babilema kaj ŝajne amuziĝas de nia (iom nekutima) kompanio. Menuo tute ne estas, sed la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj aperas antaŭ ni , sen ke ni devu mendi ilin. Fakte, la posedantino kuiras antaŭ ni, prenante ingrediencojn de eta (triono de kutima amerika) fridujeto. Mi havas multe da okazoj uzi la plej utilan vorton, kiun mi lernis en la japana : « ojŝii ! » — « bonguste ! »



**Daruma, la fama japana nefaligebla pupo, ornamanta la restoracion**

# Monda Pupekspozicio dank' al Esperanto !



*Etsuo Miyoshi (Japanio)*

***Bienvenue à la douzième exposition de poupées à Higashikagawa (Shikoku, Japon), grâce à l'espéranto ! 15.000 visiteurs, 700 poupées provenant de 41 pays du monde, dont 10 faites en Ouzbékistan pour cet évènement !***

La Dua Monda Pupekspozicio okazinta en la urbo Higashikagawa (Ŝikoku, Japanio) inter la 29a de septembro kaj la 8a de oktobro sukcesis venigi 15.000 vizitantojn. Inter ili troviĝis la guberniestro, la prezidanto de la Gubernia Turisma Asocio kaj nia urbestro. La ambasadoroj de Argentino, Kroatio kaj Uzbekio sendis gratulleterojn elstarigante la gravecon de la kulturaj interŝanĝoj per tiaspecaj eventoj.



Ĉi-jare estis reprezentataj 41 landoj per 700 pupoj faritaj el metalo, papero, maizaj folioj, ligno, porcelano, ŝtofo kaj plasto. La tuta kolekto estis farita danke al la kunlaboro de esperantistoj. Elstare menciendas, ke la uzbeka registaro sendis 10 aŭtentikajn marionetojn, speciale faritajn por tiu ĉi evento.

Tre aprezataj estis la vestaĵoj de la laosaj pupoj, la marioneto el Mianmaro, la mongolaj ĉevalistoj kaj indiĝenoj el Kanado. Ankaŭ japanaj pupoj estis montritaj en 20 hejmoj ĉirkaŭ la ĉefa ekspoziciejo.

En la inaŭgura tago, la prelego de Atilio Orellana Rojas sukcesis plenigi la salonon. Tiam la vizitantoj estis bonvenigataj por mateo, tradicia trinkaĵo el Argentino, nun tute laŭmoda en Japanio. Li prezentis pupojn el Argentino, Bolivio, Nepalo kaj Suda Koreio.

Plia ero en la programo estis parado kun 200 diverslandaj kostumoj, pupa kabuko, pupteatraĵo, ateliero pri farado de pupoj el



japana papero. La lokaj manĝejoj servis pladojn el Eŭropo, Usono kaj Azio, ekzemple hindan kareon, seriolan* hamburgeron, filipinajn frititajn bananojn, udonon*.

La amaskomunikiloj subtenis la aranĝon per aperigo de sep artikoloj en kvin lokaj kaj regionaj ĵurnaloj ; plie unu radia kaj kvin televidaj stacioj informis sesfoje pri la evento. Rimarkinde estas, ke la konata TV-kanalo NHK faris dufoje rektajn elsendojn, kiuj tiel efikis, ke la publiko kelkmilobliĝis.

Ni nun kovas planon por la venontjara ekspozicio kun pli bunta reprezentantaro, diversspecaj teatraĵoj kaj opero, ktp.

Bonvenon al la Tria Monda Pupekspozicio en 2013 en Higashikagawa!

*Etsuo Miyoshi estas prezidanto de Nova Turisma Asocio de Higashikagawa*

**seriolo : fiŝo ; udono : japanaj makaronioj*

## Venu kunfesti
## la 30an datrevenon de ESK!

**Kie :** restoracio *L'Amère à boire,* 2049, rue Saint-Denis, metro-stacio Berri-UQÀM

**Kiam :** sabaton, 15an de decembro, ekde la 17a h

**Programo:** muziko, kantado, kaj multaj surprizoj.

**Nepre venu ! Viaj amikoj estas bonvenaj. Tio estos neforgesebla evento en neforgesebla etoso !**

**Informoj, kontribuoj:** normandfleury (ĉe) gmail.com

## Avo Frosto respondas en Esperanto jam 10 jarojn !

Sendu al li manskribitajn leterojn al la adreso :



# LA URBO KIEVO… LA URBO KIOTO

***TAHIRA Masako (Japanio)***

De la 11a ĝis la 25a de aŭgusto 2012 junaj geedzoj Ĵenja Amis kaj Joel Amis gastis ĉe mi en Kioto. Ĵenja estas el Kievo, Ukrainio, kaj Joel el Atlanto, Usono. Kievo kaj Kioto estas ĝemelaj urboj.


TAHIRA Masako (maldekstre) kaj Minoru, kun kelnero

En la 24a de aŭgusto mi kaj mia edzo TAHIRA Minoru invitis la paron al restoracio « Kievo » en Kioto. Ĵenja ne nur tre ĝojis gustumi ukrainan kaj rusan kuiraĵojn, sed ankaŭ interparoli kun la mastro (KATOU Mikio) kaj kelnero de la restoracio en la ukraina lingvo. Ŝi unuafoje parolis ukraine dum la vojaĝo tra Japanio, ĉar ĉiam esperantistoj « krokodilas Esperante ».

La patro de la mastro, KATOU Kouŝirou, fondis la restoracion antaŭ 40 jaroj, kiam Kioto kaj Kievo ĝemeliĝis. La nomon de la restoracio « Kievo » rekomendis al li la urbo Kioto, ĉar li kunlaboris por la ĝemeliĝo. En la restoracio abundas kievaĵoj kaj ukrainaĵoj : multaj pupoj, pentraĵoj, 40-jara memortapiŝo kun la emblemoj de Kievo kaj Kioto. Foje okazas koncerto de ukrainaj kaj rusaj muzikoj kaj dancoj. Por la kelnero paroli ukraine rekte kun kievano estis la unuafoja sperto post ellernado de la ukraina lingvo. Li emocie ĝojis.

La mastro sciis, ke mi estas esperantisto, ĉar kelkfoje mi vizitis la restoracion kun esperantistoj. Li demandis, kie naskiĝis Zamenhof. Mi klarigis ĉion kaj aldonis, ke Esperanto havas 125-jaran jubileon. Aliaj gastoj en la restoracio envie rigardis nin, du parojn, libere parolantaj Esperante kaj Ĵenjan gaje parolanta kun la mastro kaj kelnero ruse kaj ukraine. La lasta vespero en Kioto por Ĵenja kaj Joel estis neforgeseble feliĉa.

En Kievo troviĝas Kioto-strato kaj Kioto-parko, antaŭ kiu Ĵenja naskiĝis. Ŝi diris, ke ŝi venis kvazaŭ al sia naskiĝloko ! Sed en Kioto mankas Kievo-strato kaj Kievo-parko. Antaŭ la urbodomo staras nur monumento donacita de Kievo. Ni bedaŭras la mankon de tempo viziti la urbodomon kvarope por proponi almenaŭ nomi iun straton « Kievo-strato », eĉ se ne nomi iun parkon « Kievo-parko ».

# Ni honoru nian antaŭulon

*Silvano* **La Lacerto** *Auclair*



**Esperanto ne estis la unua internacia lingvo spertinta sukceson. Iuj eĉ diras, ke la vojo, kiun iris Esperanto, estis unue pavimita de… volapük.**

***Une langue internationale qui a connu un succès fulgurant dans la décennie qui a vu naître l'espéranto, la volapük.***

Volapük estas kreita en 1879 de Germana katolika pastro Johann Martin Schleyer. Li mem diris, ke la preskaŭ tute pretan lingvon sciigis al li Dio dum sendorma nokto. Tiu deveno eble klarigas la sintenon, kiun Schleyer havis kontraŭ sia lingvo. Li publikigis « sian » verkon en 1880, kaj tiu solvo al la mondlingva problemo tuj ekhavis grandegan sukceson, unue en Germanio kaj aliaj germanlingvaj landoj, tre baldaŭ en aliaj Eŭropaj landoj. Ĝi atingis Rusion (kaj verŝajne Zamenhofon) en 1885.

La baza ideo de volapük tre similas al tiu de Esperanto : aro da radikoj el diversaj eŭropaj lingvoj, libere kunmeteblaj, kun prefiksoj, sufiksoj kaj gramatikaj finaĵoj. Tamen oni povus diri, ke Schleyer ŝovis tiun ideon tro foren.


Unue, li tre ŝatis mallongajn radikojn. Kaj li volis eviti malfacilajn konsonantojn. Sekve, en la lingvo abundas unusilabaj vortoj, aŭ pli precize radikoj, plej ofte en la formo KVK (konsonanto-vokalo-konsonanto). Multaj radikoj venas el la angla aŭ la germana, sed estas ofte malfacile rekoni ilin. Ekzemple, la vorto por *viro* estas *man* ; ĝis nun, nenio por diri. La vorton por *domo* aŭ *loĝi* tamen ne povis veni el la germana *Haus* aŭ el la angla *house*, ĉar *h* estas evitinda konsonanto, kaj *s* jam markas la pluralon ; sekve Schleyer elektis *dom*. Bone. Sed kiel diri *mano*, se jam estas uzita *man* kaj se *h* estas evitinda ? En tiu kazo, Schleyer simple inversigis kaj el tio rezultis… *nam*.

Krome, la kreinto de volapük opiniis, ke la litero *r* estas tro malfacila por ĉinoj ; li tial apenaŭ uzis ĝin. Pro tiu decido, la vorto *rozo* iĝis… *lol*. Ne ridu. Kaj *Francio* estas… *Flentän* (-än estas sufikso por landoj). Sed *rabato* tamen estas… *rabat*.

En 1931, okazis granda revizio de la lingvo, per kiu oni neniigis la gramatikan seksismon kaj enkondukis la literon r. Ekzemple, la vorto por *pluvo*, *lömib*, fariĝis… *rein*. La sekva prezento tamen temas pri la originala lingvo.

## Alfabeto kaj prononco

Volapük uzas la 26 literojn de la alfabeto, krom q kaj w. La litero c prononciĝas kiel ŝ aŭ ĝ ; la litero j, kiel ŝ ; la litero z, kiel c aŭ dz. X estas ks aŭ gz. Kvankam Schleyer atentoplene evitis tro malfacilajn konsonantojn, li tamen uzis tri kromajn *vokalojn* : ä (prononciĝas kiel la franca è), ö (kiel la franca eu) kaj ü (kiel la franca… u). La literon *e* oni zorge ĉiam prononcu kiel la franca é, eĉ se sekvata de konsonanto. La akcento ĉiam falas sur la lastan silabon, verŝajne por klare difini la limojn de la vortoj, kaj kvankam tiu silabo tre ofte estas nur gramatika finaĵo. Ekzemple : *volapük* (mondlingvo), sed *volapüki* (mondlingvon ; la direktan akuzativon uzas ankaŭ volapük), *volapüka* (de mondlingvo) kaj *volapüke* (al mondlingvo). Oni povas rimarki, ke la *mondlingvo* uzas la samajn kazojn kiel la germana.



**Simbolo de volapük**

## Seksismo en volapük

La originala volapük estas eĉ pli seksisma ol Esperanto. Estas tri finaĵoj por la tria singulara persono, sed la vira uziĝas por viroj, objektoj, bestoj, ktp, dum la neŭtra uziĝas nur por senpersonaj esprimoj, kiel *pluvas*. Simile, preskaŭ ĉiuj bazaj nomoj de homoj kaj bestoj estas viraj, krom kelkaj : *vom* (virino aŭ edzino), *mot* (patrino), *kun* (bovino), *läd* (sinjorino). Alie, oni devas aldoni la prefikson *ji-* (prononcu ŝi): *jireg* : reĝino, *jijeval* : ĉevalino. Kiel en Esperanto, oni povas maskligi bestojn per prefikso : *omjeval* estas *virĉevalo*. Same kiel en Esperanto, kaj en la germana, ekzistas vorto por homo : *men*. Sama epoko, samaj solvoj.

## Gramatiko

La gramatiko de volapük estas tre… treege regula. Kaj bunta. Kiel dirite, estas kvar kazoj (kaj la genitivo ankaŭ utilas por kunmeti vortojn, kiel en vol**a**pük, lingvo **de** mondo), kaj, ankaŭ kiel dirite, la pluralon oni markas per s. Sekve, *viro* havas la jenajn formojn : *man, mani, mana, mane, mans, manis, manas, manes*. De la pronomo mi, *ob* (kaj ankaŭ *obi, oba, obe*…), oni *regule* derivas la

pronomon ni, *obs* (kaj *obis*...). Ĉiuj adjektivoj *(adurigota)* finiĝas per (akcentita) *-ik*, kaj venas *post* la nomo al kiu ili rilatas, krom se estas pluraj. Eĉ nombroj venas post la nomo, kiel en la slogano de volapük : *menad bal, pük bal* : homaro unu, lingvo unu. (La ordaj nombroj tamen finiĝas per aparta sufikso, -*id* : *balid* : unua.) Adverboj havas finaĵon o : *gud* = bono ; *gudik* = bona ; *gudiko* = bone. *Gudikum* = pli bona ; *gudikün* = plej bona. Kaj kion signifas *gudikumo* kaj *gudiküno* ?

Sed la kulminon de tiu kunigo-ludo Schleyer atingis en la verba sistemo. Ĉiuj verbaj formoj estas unuvortaj kaj inkluzivas la subjekton, la tempon, la modon kaj eventuale la pasivon aŭ la refleksivon. Simpla frazo kiel *mi amas* tradukiĝas al *löfob* (kie *ob* estas la subjekto). Sed *ci estis vidata* iĝas *pälogol* : p por la pasivo ; ä por la imperfekta tempo ; *log* estas la radiko (por *vidi* **kaj** *okulo*, tamen interesa vortara plisimpligo), kaj *ol*, la subjekto. Volapük konas ses tempojn (prezenco, imperfekto, perfekto, pluskvamperfekto, futuro kaj futura perfekto, markitaj respektive de a, ä, e, i, o kaj u, en tiu ordo). Ĝi ankaŭ konas sufiksajn infinitivon (-ön), participon (-öl), imperativon (-öd), sed ĝentile estas -ös, kaj ordonoj estas kun -öz), kondicionalon (–öv), kaj potencialan (-öx). La kontinuaj tempoj estas markitaj jene : ai-, äi- ei-, ii-, oi- kaj ui-. Derivitaj prepozicioj finiĝas per ü, kaj interjekcioj, per ö : *brave !* estas *bafö !*

**Patro Nia en volapük**

O Fat obas, kel binol in süls,
Paisaludomöz nem ola !
Kömomöd monargän ola !
Jenomöz vil olik, äs in sül, i su tal !
Bodi obsik vädeliki givolös obes adelo !
E pardolös obes debis obsik,
äs id obs aipardobs debeles obas.
E no obis nindukolös in tendadi ;
sod aidalivolös obis de bad.

Eble vi nun jam komprenas problemon, kiu trafis la lingvon. Bona lingvo devas esti signife fortika. Oni devas kapabli kompreni frazon eĉ se iu faras etan eraron, se estas bruo en la ĉambro aŭ makuleto sur la papero. En volapük, tio apenaŭ eblas. Plej eta misprononco (kaj ili jam devas okazi en internacia lingvo) aŭ miskompreno tute ŝanĝas la signifon.


En la unuaj du kongresoj de volapukistoj, oni parolis la germanan. Ĉiuj estis feliĉaj. En la tria, oni… provis volapukon. Kun granda masukceso. Elektiĝis akademio, kiu volis fari ŝanĝojn en la lingvo, sed Schleyer rifuzis. Eble ĉar oni ne ŝanĝu Dian donacon. Tiam Esperanto estis aperinta, kiu aspektis pli simpla. La movado rapide disfalis. Ĝi tamen plu ekzistas, kaj havas ĉefon (*cifal*), la Brito Brian Bishop. Eĉ estus anstataŭonto… Bonan ŝancon al vi.

# Plia flago por la Tero

*Silvano Auclair*

**Antaŭ kelkaj jaroj, mi verkis en *La Riverego* (n-ro 99) artikolon pri kelkaj flagoj por la Tero — tiun ideon mi trovas tre bona. Antaŭnelonge, mi ektrovis alian proponon, kiu ŝajnas al mi diskoniginda. Temas pri la Monda Flago de *Brandpowder Team, eksperimentoj en vida komunikado.***

Temas pri kolektiva pripensado de multlanda grupo de pli ol 20 homoj, kaj la rezulto baziĝas sur la koloroj de la nunaj landaj flagoj. Fine ni ricevas flagon kun dek koloroj (inkl. la nigran bendaron). Ĉar la koloroj estas proporciaj al la spacoj, kiujn ili okupas en la nunaj flagoj, kaj proporciigitaj al la loĝantaro de ĉiu lando, estas evidente, ke la Ĉinia ruĝo superregas. Jen la flago :



Mi ŝatas tiun flagon, ĉar, kvankam ĝi havas evidentan ligon kun la nuna Tera loĝantaro kaj ties kulturoj, ĝi ne devigas iun simbolon aŭ klarigon ; ĉiu povas interpreti la kolorojn laŭ sia propra kulturo. La ruĝa koloro, ekzemple, ja povas signifi sangon, sed ankaŭ kuraĝon, amon, agresemon, varmon kaj fierecon.

Oni tamen proponas, ke la ruĝa signifas sangon ; la bluo, liberecon ; la verdo, la teron, agron ; la blanka, la valorojn ; la flava, la riĉecon ; la nigra, la rasajn radikojn ; la oranĝa, fortecon ; la bruno, la naturon ; la grizo, la instituciojn ; kaj la viola, la seksojn.

La flago ankaŭ ne entenas mapon, kiu estas evitinda, laŭ iuj flagspertuloj. Sen paroli pri fotoj…

Franca esperantisto, Éric Coffinet, ankaŭ kreis du (tre similajn) flagojn, kiuj laŭ mi tre similas al tiu desegnita de James W. Cadle kaj kiu bele montras flavan sunon, bluan Teron kaj blankan Lunon sur spacnigra fono (vidu la n-ron 99 de *La Riverego*). Ili iam aperis en la Vikipedia artikolo pri *Tera Flago*. Jen ili (aŭ ĝi en du formatoj) :






# Kiel vermonta restoracio famiĝis pro Esperanto

## *Ĵenja (Yevgeniya) Amis*

***Dans la ville de Burlington, Vermont, se trouve un restaurant qui porte le nom de notre langue. S'il collecte 1000 « j'aime » chez Facebook, il va donner mille dollars à une banque alimentaire. Faites votre part et aidez à nourrir les pauvres en cette saison de fêtes !***

**Antaŭ kelkaj monatoj en kanada televido oni montris novaĵeron pri la urbo Burlington, Vermonto. Oni raportis, ke en tiu ĉi loko, kiun National Geographic eĉ nomis « perfekta eta urbo », por altiri franclingvajn turistojn, la registaro aktive kuraĝigas la komercojn uzi la francan lingvon : farante dulingvajn afiŝojn, tradukante menuojn kaj dungante vendistojn, kiuj scipovas la francan. Mi havis tute neatenditan okazon viziti tiun ĉi ĉarman ĉe-lagan urbon, kaj eĉ se mi ne trovis la urbon aparte dulingva (fakte, neniuj lokanoj, kun kiuj ni babilis, eĉ sciis pri tiu projekto dulingvigi la urbon), ni tamen malkovris tie ion, kiu iusence famigis tiun urbon inter esperantistoj tra la mondo !**




Unue mi klarigu, kial nia vizito al Burlington estis neatendita. Ni iris al Usono por aranĝi kelkajn bankajn aferojn, kaj post horo da ŝoforado ni rimarkis, ke ni iras al malĝusta direkto. Do, anstataŭ Novjorkio, kien ni planis iri, ni decidis iri al Vermonto. Bonŝance, ni atingis la bankon ekzakte tri minutojn antaŭ la fermo. Sed kia surprizo (aŭ sinkroneco ?)! Tuj trans la strato de la banko troviĝas restoracio Esperanto. Kompreneble, ni ne povis maltrafi la okazon viziti ĝin. Mia duonŝerca demando en la angla « Ĉu vi havas la menuon en Esperanto? » iom konfuzis la kelneron, kaj mi devis ripeti ĝin dufoje. Kvankam li bone konsciis pri la nomo kaj ĝia rilato al la lingvo, li ne komprenis, ke antaŭ li troviĝas homoj, kiu fakte parolas tiun lingvon.

De la kelnero mi eksciis, ke la restoracio funkcias ekde 1995 kaj estas aparte populara inter junuloj (verŝajne, ĉar la prezoj estas tute akcepteblaj, kaj la porcioj estas tute malavaraj). Ili elektis tiun nomon ĉar oni ŝatis la ideon de Esperanto (fakte, sur la muroj oni povas legi klarigojn pri Esperanto prenitajn el Vikipedio), kaj eĉ la menuo estas farita por iusence reprezenti la lingvon : ĝi estas kreema elekto de usonaj, mediteraneaj, meksikaj kaj aziaj pladoj, multaj vegetaran-amikaj. Mi lernis ankaŭ , ke la restoracio organizas grandan bonfaran kampanjon por helpi la malriĉulojn kaj samtempe diskonigi la restoracion ĉe Facebook : se ili kolektos mil « ŝatojn », ili donacos  mil dolarojn al la loka manĝaĵ-banko. Reveninte hejme, mi plusendis tiun informon al miaj amikoj, kiuj plusendis ĝin al siaj amikoj, ktp. Ene de kelkaj tagoj la retejo ricevis jam ĉ. ducent pliajn « ŝatojn » kaj tiel multe pli alproksimiĝis al la necesaj mil. La respondeculoj de tiu paĝo de restoracio estis tute surprizitaj pri la « inundo » de novaj ŝatoj de ĉie en la mondo : Kostariko, Japanio, Rusio, Nederlando, Hungario… Multaj homoj lasis salutojn, komentojn, kuraĝigojn, fotojn kaj informojn pri aliaj restoracioj kun la nomo « Esperanto » kaj, kompreneble, sinproponojn traduki la menuon en Esperanto. « La kvanto de la lingvoj ĉe nia retejo jam preterpasas niajn kapablojn », skribis la respondeculoj kaj petis helpi traduki la ricevitajn esperantlingvajn mesaĝojn. Kompreneble, venis kaj tradukoj, kaj la informoj, kie oni povas lerni Esperanton (Lernu.net) kaj la eblo uzi Google Translate. Finfine, la posedantoj de la restoracio eĉ mem respondis en Esperanto (surprize, eĉ tute bona!).



La strato Church, la plej bela en Burlington

Se vi ankoraŭ ne ŝatis tiun paĝon, bonvolu fari tion kaj plusendu al viaj amikoj ! Tio helpos ne nur nutri la malriĉulojn dum tiu ĉi festa sezono, sed ankaŭ montros, ke Esperanto estas vivanta kaj uzata lingvo… kaj jes, ankaŭ en Usono!

www.facebook.com/esperantoburlington

# La dancmetodo de Margaret Morris

***Minjo Renaud***

***Au programme de la rencontre ARE 2012 : un atelier sur la méthode de danse créée par Margaret Morris, une des pionnières de la danse moderne.***

Margaret Morris estis unu el la pioniroj de moderna danco. Ŝi kreis sian danc-metodon en 1910 en Anglujo. Ŝi estis ankaŭ fizikoterapiisto, kaj ŝia metodo taŭgas por ĉiuj, sendepende de aĝo aŭ fizika stato. Ŝiaj ekzercoj emfazas korpan teniĝon, kunordigon, ekvilibron, movan fluecon kaj la kreivon aplikatan dum momentoj de improvizado.



Tiun metodon mi praktikadas de pluraj jaroj, ĉefe en Montrealo, sed ankaŭ, de tempo al tempo, ĉe staĝoj en Otavo, Trent, Toronto. Diplomiĝinte pri ties baza nivelo en Anglujo en 2010, mi decidis proponi lecionon pri ĝi en ARE (Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista) 2012.

Dimanĉon matene, komence mi prezentis, dum dek kvin minutoj, la vivon de Margaret Morris.

Poste, dum tridek minutoj, ni ĉiuj ekzerciĝis laŭ la principoj de ŝia metodo : unue varmigado, poste tekniko, fine improvizado. Ĉar la partoprenantoj ŝatis sian sperton, ni denove ekzerciĝis dum tridek minutoj la sekvan matenon, akompanate de la ritma muziko de la grupo *Kaj tiel plu*. Tiel, energie, komenciĝis nia lasta tago !



# La Kristnasko de Hoodoo McFiggin

*Stephen Leacock* (1869–1944)*

*Tradukis Stéphane Brault*

**Tiu ferakonto pri Sankta Nikolao — oni ĉesu kredi stultaĵojn tiajn. Estas perfida, malnobla fraŭdo, kaj ju pli baldaŭ oni rivelos la veron pri ĝi, des pli bone por la tuta socio.**

La gepatroj, kiuj leviĝas meznokte kaj, profitante de la mallumo, donacaĉas dekcendan kravaton al knabo, kiu esperoplene atendas dekdolaran poŝhorloĝon, estas fiaj, preterdube fiaj.

Mi havis bonan okazon observi la pasintan Kristnaskon, kiel disvolviĝas la dramo ĉe la juna Hoodoo McFiggin, filo kaj heredonto de la McFiggin-oj, en kies hejmo mi estas pensionano.



Hoodoo McFiggin estas bona knabo — pia knabo. Oni komprenigis al li, ke Sankta Nikolao nenion estus dononta al liaj gepatroj, ĉar plenkreskuloj ne ricevas donacojn de la anĝeloj. Li do ŝparis sian tutan poŝmonon kaj aĉetis cigarskatolon por sia patro kaj sepdekcendan diamantan broĉon por sia patrino. Sian propran sorton li konfidis al la anĝeloj. Sed li preĝis. Li ja preĝis ĉiunokte dum semajnoj, por ke Sankta Nikolao alportu al li paron da sketŝuoj kaj hundidon kaj aerpistolon kaj biciklon kaj miniaturan arkeon de Noa kaj tamburon — entute aĵaron ĝis valoro de cent kvindek dolaroj.

Mi eniris la ĉambron de Hoodoo tre frue la Kristnaskan matenon. Certa mi estis, ke la sceno estos interesa. Mi vekis lin, kaj li eksidis en sia lito, kun okuloj pro ĝoja espero brilaj, kaj komencis eltiri aĵojn el sia ŝtrumpo.

La unua donaco estis volumena ; pakita loze, ĝi prezentis iom nekutiman aspekton.

« Ha-ha ! » Hoodoo gaje ekkriis, disŝirante la volvaĵon. « Ĝi certe estas la hundido, tute envolvita per papero ! »

Kaj ĉu estis hundido ? Tute ne. Estis paro da botoj,

* Stephen Leacock estis fama kanada humura verkisto anglalingva

fortikaj botoj de grando 4, akompanataj de laĉoj kaj de noteto : « Por Hoodoo, de Sankta Nikolao », kaj malsupre, Sankta Nikolao estis aldoninta : « 95 nete ».

La knabo entuziasme kuntiris la brovojn. « Botoj », li konstatis, kaj ree plonĝis la manon.

El la ŝtrumpo li komencis eltiri duan paketon kun mieno de reviglita espero.

Ĉi-foje la volvaĵo ŝajnis enhavi rondan skatoleton. Hoodoo disŝiris la paperon febre. Li skuis la skatoleton ; ene io klaketis.

« Poŝhorloĝo kaj ĉeneto ! Poŝhorloĝo kaj ĉeneto ! » kriis li, detirante la kovrilon.

Kaj ĉu poŝhorloĝo kaj ĉeneto ? Ne. Estis belaj, tutnovaj celuloidaj kolumoj, dekduo entute, ĉiuj similaj kaj ĉiuj laŭmezure.

La vizaĝo de la knabeto mallumiĝis pro dankema ĝojo.

Li devis atendi kelkajn minutojn por forpasigi la intensan plezuron, kaj



provis denove.

Nun la paketo estis longa, ŝajnis kompakta ĉe palpado kaj estis plimalpli funeloforma.

« Ludilpistolo ! », flustris la etulo, tremblante ekscitece. « Nu ! mi esperas, ke estas multaj prajmetoj kun ĝi ! Mi tuj pafos kelkajn por veki Patron. »

Ne, povra Hoodĉjo mia, vi ne vekos vian patron per tio. Estas ja utila afero, sed ĝi ne uzas prajmetojn kaj ne pafas kuglojn, kaj oni ne povas veki dormanton per dentobroso. Jes, estis dentobroso — ja belaĵo, tutfarita el osto, kaj akompanata de noteto : « Por Hoodoo, de Sankta Nikolao ».

Ankoraŭfoje, esprimo de intensa ĝojo ombris la frunton de la knabo, kaj jubilaj larmoj plenigis liajn okulojn. Li forviŝis ilin per la dentobroso kaj daŭrigis.

La sekvanta paketo estis multe pli granda kaj videble enhavis ion malkompaktan kaj volumenan.

Tro longa por la ŝtrumpo, ĝi kuŝis ekstere sur la planko.

« Mi scivolas, kio ĝi estas », li demandis sin, preskaŭ timante elpaki ĝin. Tiam lia koro ekbategis kaj li forgesis ĉiujn aliajn donacojn anticipe de tiu ĉi.

« Estas tamburo, granda sonora tamburo ! »

Tamburo, kukaburo ! Estis ŝorto — plej bela flavbruna ŝorto, kvadratita de ravaj koloritaj strioj, kaj denove, Sankta Nikolao estis skribinta : « Por Hoodoo, de Sankta Nikolao. Unu kvardek nete ».



Sed io estis volvita en ĝi. Ho, jes ! Ŝelko estis volvita en ĝi, ŝelko kun tiaj glitumaĵetoj, kiuj ebligas vin glitlevi la pantalonon ĝisŝultre, se vi deziras.

Ravego plorĝemetigis la knabon. Li eltiris sian lastan donacon. « Libro », li diris elpakante ĝin. « Mi scivolas, ĉu fe-rakontoj aŭ aventuroj ? Ho ! Aventuroj, mi esperas. Mi legos ĝin la tutan matenon. »

Nu, Hoodĉjo, ne precize aventuroj. Estis porinfana Biblio. Nun, Hoodoo estis vidinta ĉiujn siajn donacojn, kaj li leviĝis kaj vestiĝis. Tiel li havis la okazon amuziĝi kun la novaj ludiloj. Tio ĉiam estas la ĉefa plezuro de Kristnaska mateno.

Unue, li ludis kun la dentobroso. Li plenigis grandan akvokruĉon kaj brosis ĉiujn siajn dentojn, unu post la alia. Grandioze.

Poste, li ludis kun la kolumoj. Li estus povinta amuziĝi tiel senfine, elprenante ilin unu post la alia kaj remetante ilin sammaniere, malbenante ilin one kaj ope.

La sekvanta ludilo estis la ŝorto. Li pasigis plezuregan tempon metante kaj demetante ĝin, kaj provante diveni, kiu flanko estas la fronto kaj kiu la dorso simple per rigardo.

Poste li malfermis la libron kaj legis aventuran rakonton titolitan « Genezo » ĝis la horo de la matenmanĝo.

Tiam li malsupreniris kaj kisis siajn gepatrojn. Patro fumis cigaron, kaj Patrino estis alpinglinta sur sin la novan broĉon. Hoodoo ŝajnis enpensiĝinta, kvazaŭ freŝa ideo ĵus ekkaptus lian menson. Fakte mi pensas, ke la venontan Kristnaskon, li preferos konservi sian monon kaj atendi por vidi, kion alportas la anĝeloj.

*(Bildoj el la desegnofilmo* Hoodoo McFiggin's Christmas, *1995, fare de National Film Board of Canada)*

# Lernu malkaŝas eron de la nova kursrakonto

**Lernu.net, kun komunumo de preskaŭ 130 000 registritaj uzantoj, estas la plej granda projekto kiun subtenas [Esperantic Studies Foundation](#) (ESF). Milo da personoj studis Esperanton per la senpagaj kursoj kaj lerniloj de Lernu. Nun, ESF financas kompletan modernigon kaj relanĉon de la paĝaro, por pretigi ĝin por uzo kun novaj teknologioj, kaj por plibonigi kaj ĝisdatigi la enhavon.**

La nova lernu.net lanĉiĝos en frua 2013 kun tute rekonstruita paĝaro, nova ampleksa kurso, nova biblioteko, kaj novaj forumoj. La nova kurso por komencantoj kreiĝas laŭ nivelo A1/A2 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) por instruado de lingvoj. Ĝi baziĝos je rakonto verkita speciale por lernu.net de populara verkisto Anna Löwenstein, aŭtoro de *La ŝtona urbo*. Löwenstein kunlaboras kun sperta edukisto Birke Dockhorn por verki interesan kaj atentokaptan rakonton, kiu enkondukos gramatikajn elementojn iom post iom, kaj fariĝas lingve pli malfacila en ĉiu ĉapitro.





Per la rakonto, lernantoj lernos kiel trakti diversajn kutimajn viv-bezonojn en Esperanto — kaj ankaŭ kelkajn bezonojn kiuj estas pli specifaj por Esperantujo.

Kvankam tradiciaj lingvokursoj ofte uzas enuajn tekstojn por instrui lingvon, la teamo de Lernu opinias ke interesa rakonto povas instrui lingvon same efike, kaj instigi al lernantoj fini la kurson, por ekscii kiel finiĝos la rakonto. La novan rakonton riĉigos ekzercoj, kreitaj de Birke Dockhorn, kaj ilustraĵoj kiuj estas desegnataj speciale por Lernu.

Ĉi tie, vi povas legi fragmenton de la nova rakonto, kaj vidi ekzemplan ilustraĵon:

*Donacoj al ESF ebligas daŭrajn plibonigojn al lernu.net kaj aliaj gravaj projektoj. Ĉu ankaŭ vi volas subteni la pliampleksigon, plibonigon kaj pliefikigon de Lernu kiel ilo por disvastigi Esperanton tra la mondo? Kontribuu al la kampanjo* 100.000 EUR por ESF : http://kampanjo.ikso.net/eo !

# Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| 18-20a de majo 2013 : 10a MEKARO | Otavo, Ontario |
| 20-27a de julio 2013: Universala Kongreso | Rejkjaviko, Islando |
| 12-14a de oktobro : 20a ARE (Silver Bay, Lake George) | NY, Usono |
| 17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO | Sherbrooke, Kebekio |
| 16-18a de majo 2015: 12a MEKARO | Toronto, Ontario |
| 21-23a de majo 2016: 13a MEKARO | Granby, Kebekio |
| *provizore: 14 MEKARO (2017) : Kingstono (Ontario) ; 15a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)* | |

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

| | | |
|---|---|---|
| Sabato 15a de decembro 2012, ekde 17 h | L'Amère à boire | 153-a datreveno de L.L. Zamenhof |
| Vendredo 11a de januaro 2013, 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo 25a de januaro 2013, 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo 8a de februaro 2013, 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo 22a de februaro 2013, 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo 8a de marto 2013, 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo 22a de marto 2013, 18 h* | MEDO | Brita mango (alportu ion !) |

* Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30

**Commensal St-Denis (restaurant végétarien / flexitarien ) :** 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, metro « Berri-UQAM »). **MEDO (Montreala Esperanto-Domo) :** 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK :** Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2013.2.20**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction : Sylvain** Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE :** Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseillère), Den Drown (conseiller).

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**

6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

Vidu retejon por vidi kiel atingi

Voir site web pour un plan d'accès

Biblioteko nepre kun antaua rendevuo

Bliothèque sur rendez-vous seulement

## Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ce vi : www.pasportaservo.org. Vi povas ankau kontakti Jenja Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

